Carl Riedel,

Aŭdu, paŝtistoj

tradukita de Albrecht Kronenberger

Aŭdu, paŝtisto,
mi diras al vi
Bonan sciigon
pri l' Filo de Di':
Enkarniĝinta,
ĵus naskiĝinta,
Ĉirkaŭvindita,
entrogigita.
Gloron al Li!

Vidu, homidoj,
la amon de Di'.
Malsupreniris
la Vorto por vi.
Kruce murdota,
entombigota,
Resurektonta,
ĉiel-ironta.
Gloron al Li!

Venu, kristanoj,
rapidu al Li,
Kiu bebiĝis
en stalo por vi.
Miru ĝojante,
kore kantante,
Genufleksante,
Lin adorante.
Gloron al Li!

Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL *(*1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de* ALBRECHT KRONENBERGER *(*1940-01-21) en 1990.*

Arg-565-1142 (2010-09-20 11:11:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la retejo `http://reocities.com/cigneto/thctxt/a/auxdupasx1.html`.